pavo. Vi certe neniam vidis ĝin – ĉar oni povas teni ĝin nek en publikaj nek en zoologiaj ĝardenoj: kvazaŭ sovaĝaj bubaloj la masklaj kaj la inaj birdoj atakas ĉiun ajn vivulon, beston aŭ homon, kiu hazarde krucas ilian vojon... (2005-07-04/05)

**Priaranee**

Kiuj el niaj insektomanĝemaj bestetoj pli multe konsumas – ĉu la birdoj aŭ la aranaeoj? La brita araneo-esploristo *W.S. Bristowe*, unu el la plej grandaj grandkapuloj de araneologio, iam realigis en herbeja areo en *Sussex*/Britujo nombradon de la tiea aranea populacio. Sur areo de ĉ. 2500 kvadratmetroj li trovis 2,5 milionojn da tiuj ne ĉie ŝatataj krablemaj estaĵoj. El tiu nombro kaj aliaj naturscienca kalkuloj li sumigis la genealogian populacion de la araneoj en Anglujo kaj Kimrujo ĝis nekredeble granda cifero, nome pli ol 2 duilionoj. Ĉe pli ol rezerviĝema supozo, ke ĉiu unuopa araneo likvidas en 1 jaro po 100 insektojn, la esploristo elkalkulis 220 000 000 000 000 (220 duilionojn) da insektoj mortigitaj ĉiujare de araneoj. Ho, kia situacio estus reganta en nia insektoplena mondo sen niaj karaj, karaj araneoj… (2004-11-29)

**Prikunikle**

Britaj ĝentlemanoj elpensis en la 19-a jarcento superan ideon, por pliviligi la ĉas-plezurojn en Aŭstralio, liberigi tie kuniklojn. Tiuj bestetoj plimultiĝis, kiel konate, en nekredebla rapideco. Al la perdo de malpli postviv-sukcesaj hejmospecioj akumuliĝas ekonomia perdo de ĉ. 600 milionoj da dolaroj jare. Jam antaŭ 50 jaroj oni enkondukis viruson kontraŭ la sovaĝronĝuloj, sed ĉe la kunikloj baldaŭ disvolviĝis rezisteco. Nun oni volas denove kontraŭbatali la kuniklojn – ĉi-fojon pere de genetike ŝanĝita noveldono de la sama viruso, kiu laŭ novaj esploroj steriligas la inajn kuniklojn. Ho ve – oni nepre pripensu eventualajn aliajn sekvojn! La viruso eble povus ŝanĝi la gastigantojn kaj/aŭ en tiuj fariĝi mortiga. Aŭ la vulpoj – same "ekzotikaj" por Aŭstralio – komencus sen la ĝisnuna kunikla nutraĵo ĉasi hejmajn aŭstraliajn bestetojn. Pli bone estas, unue science prilabori kaj reserĉade elprovi tion – ĉu? (2004-11-01)


# Scienca Revuo Vol. 56 (2005)(3) / n-ro 202

*Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)*
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

**Pres-indikaĵoj : ISSN 0048-9557.**
**Eldonanto: ISAE**
**Laserkopiita : Novembro 2005**
**ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30, DE - 37269 Eschwege*/Germanio**
**Responsa redakta teamo : La estraro de ISAE**

**Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare**
**pagebla pere de via**
**a) landa peranto (resp. landa delegito)**
**aŭ rekte al**
**b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z** *) *vd. sube*

**Landaj Perantoj de ISAE**

| | | |
|---|---|---|
| **Aŭstralio** | *Libroservo AEA* | *<Libroservo@ans.com.au>* |
| | *143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | |
| **Brazilo** | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| | *C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasilia* | |
| **Britio** | *S-ro Paul Hewitt* | *<paul@esperanto.freeserve.do.uk>* |
| | *26, Highfield Rd., North Thoresby* | |
| | *Grimsby, N.E. Links, GB – DN36 5RT* | |
| **Finnlando** | *S-ino Heta Kesälä* | *<heta.kesala@pp.inet.fi>* |
| | *Kalamihenkuya 3 D 32, FI-4300 Tuusula* | |
| **Francio** | *S-ro Charles Trébouet* | *<trebouet.bohere@compagnet.fr>* |
| | *Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | |
| **Irlando** | *S-ino Joy Davies* | *<noviresp@eircom.net>* |
| | *9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | |
| **Korea Resp.** | *S-ro Cho Sung Ho* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| | *Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | |
| **Norvegio** | *Eldonejo Esperanto* | *<hara-ryg@online.no>* |
| | *Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | |
| **Pollando** | *S-ino Maria Majerczak* | *<mamajer@interia.pl>* |
| | *ul. Armii Krajowej 7 m 122, PL - 30 150 Kraków* | |
| **Svedio** | *S-ino Lisbeth Andreasson* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| | *Södra Rörum pl. 455, SE 24294 Hörby* | |
| **Usono** | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)* | *<elna@esperanto-us.org>* |
| | *P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b)**
**(kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendota Scienca Revuo) la eldonanton:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***